

n-ro 44

aprilo 1994

ISSN 0941-9306

Internacia
Komerca kaj
Ekonomia
Fakgrupo

La Merkato



S-ro Lee Teck-Shiu (maldekstre) kaj Eruda (meze) el Hongkong kun Daniel König en Ladenburg, Germanio (inter la urboj Mannheim kaj Heidelberg) antaŭ memorŝtono de Carl Benz; inventisto de la aŭtomobilo.

Enhavo:

Estraro, sidejo, kotizoj, kontoj kaj perantoj	2
Saluton; Administrado	3
Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1993	4
Financa raporto por 1993	8
Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE)	9
Kalendaro	11
Komercaj petoj kaj proponoj	12
Hobiistoj	13
Novaj membroj	16

La Merkato (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani.

Centra sidejo: Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono+fakso: +32.(0)50.330004.

Redaktora sidejo: Ĉe s-ro Daniel König, Speyerer Str. 80, D-68535 Neckarhausen, Germanio, telefono +49.(0)6203.2765, fakso +49.(0)6203.16432.

La jara membreca kotizo estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

Kontoj: Ĉe UEA kaj FEL, kodo ikf-c, kaj belga poŝtĉekkonto 000-159262983. Eŭropanoj ankaŭ povas sendi eŭroĉekon en belgaj frankoj.

Perantoj:

Ĉinio: S-ro Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

Francio: S-ro François-Xavier Gilbert, Vert Coteau F-55000 Longeville en Barrois (CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl 16 (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hispanio: S-ro Pedro Antonio Macanas Valverde, Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia (Banco Central, filio 0049-2518, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Codernju", n-ro 002-672-1-0027; Kotizo: 1.800 ptas.)

Hungario: S-ro István Gether, Palóc u. 1, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco Picasso, via de Gasperi 7, I-20057 Veduggio al Lambro

Japanio: S-ro Yamasaki Seikō, J-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12 (pŝk. n-ro Tōkyō 6-253232, kotizo 1400 enoj)

Pollando: S-ro Maciej Piegat, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

Togolando: S-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

Saluton

Komence de aprilo venis s-ro Eruda kaj s-ro Lee Teck-Shiu, gekomercistoj el Hongkong, al Eŭropo. Titolpaĝe vi vidas ilin apud memorŝtono, kiu honorigas inventiston, kiu per sia produkto draste influis nian mondon. Tie, en la du-mil-jaraĝa, romana urbo Ladenburg, s-ro Carl Benz konstruis la unuan aŭtomobilon. (En la jaro 1886.)

Je alia tago ni vizitis la firmaon Imago Mundi. Inter fakuloj konata kiel unu de la gvidaj entreprenoj pri *komputila animado*. Sciante pri la Hongkonga deveno de s-ro Lee, la reprezentanto de Imago Mundi esprimis post ĉirkaŭ kvarona horo sian miron pri mia ĉinlingva parolpovo kaj pri la agrable flua sono, ne tiel azia; li neniam antaŭe aŭdis ĝin. Mi tradukis inter Lee kaj s-ro Weber (Imago Mundi), sed Esperante. La komprenebla uz(ad)o de nia lingvo lin profunde impresis.

Agrablan legadon deziras

Administrado:

Grava atentigo al niaj membroj!

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1993 kaj proponas aprobon de tiu raporto.
2. La estraro prezentas sur la paĝoj sep ĝis dek la financon raporton de IKEF por la jaro 1993, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.
3. La estraro notas la sumon de financa profito de 11.047 BEF kaj proponas aldonon de tiu gajno al la kapitalo.
4. La estraranoj s-ro Braun kaj d-ro Picasso, ambaŭ elektitaj en 1992, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ambaŭ sinjoroj pretas kandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.
5. Nia statuto, alineo 7.4, montras la procedon pri aprobo de la financa raporto kaj de la raporto pri la agado. Ĉi-jare ni ne aranĝos oficialan Ĝeneralan Kunvenon dum la Universala Kongreso en Seulo. Por tia kazo la statuto preskribas, ke aprobo de ambaŭ raportoj sekvas aŭtomate du monatojn post publikigo, krom se pli ol duono de la membroj skribe al la Ĝenerala Sekretario (Prezidanto) indikas malakcepton.

Do, se vi intencas malaprobi la raportojn, bonvolu indiki tion al la prezidanto kun nomigo de kaŭzoj du monatojn post ricevo de ĉi tiu numero de **La Merkato**.

6. Nia statuto, alineo 8, montras la procedon pri elekto de estraranoj. Ĉar ĉi-jare ne okazos oficiala Ĝenerala Kunveno, la elekto de membroj de la estraro okazos per skriba voĉdonado perpoŝte. Do bonvolu sendi ĝis 1994-06-30 vian elekton skribe al nia estrarano s-ro Gilbert, kiu administras la elektan procedon. Ĉiu membro havas du voĉojn, aŭ por reelekto de s-ro Braun kaj d-ro Picasso aŭ por nomi aliajn kandidatojn. Jen la adreso de S-ro Gilbert:

S-ro François-Xavier **Gilbert**, Vert Coteau
F-55000 Longeville en Barrois, Bar le Duc, Francio.

7. Tamen IKEF okazigos kadre de la Universala Kongreso en Seulo, Koreio, informkunvenon, en kiu ni diskutos kun ĉeestantaj membroj kaj aliaj interesatoj pri celoj kaj agadoj de IKEF. La precizan daton kaj horon kaj la salonon de la informkunveno ni avizos en la venonta **La Merkato**.

Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1993

Membraro negrave malkreskis

Dum la jaro 1993 la nombro de membroj falis de 114 komence de la jaro al 110 fine de la jaro 1993. Estis la unua fojo ekde la fondo de IKEF, post ĉiujara kresko, ke ni devis registri netan malkreskon de la membronombro.

Ne estis eble esplori la kialojn por la ekŝiĝoj, ĉar alskribite de s-ro Rotsaert, nia Financa Konsilanto kaj membradministranto, ili tute ne respondis. Ŝajnas ke multaj novaj aliĝintoj havas malĝustajn imagojn pri la celoj de IKEF; kaj kelkaj opinias prefere esti servata per IKEF, anstataŭ mem fari iun servon kadre de IKEF favore al la disvastigo de Esperanto sur la kampoj komerco/ekonomio/ekonomiko.

La Merkato denove aperis regule

Dum 1993 nia komunikilo **La Merkato** regule kaj akurate aperis kvarfoje, kvankam pro profesie kaŭzita maleblo de la oficiala redaktoro s-ro Daniel König, s-ro Roland Rotsaert aldone al sia posteno kiel Financa Konsilanto devis provizore transpreni ankaŭ la taskon de redaktoro.

Terminara Sekcio dum la tuta jaro vakis

Fine de 1992 la tiama kunordiganto s-ro Hans Wiersch (IKEF 19) estis demisiinta sian postenon. Alvoko en **La Merkato** al niaj membroj pri anstataŭa persono alportis eĉ ne unu sinanoncon. Bonŝance fine de la jaro s-ro Wiersch deklaris sin preta reveni al sia posteno.

Ni esperu nun pri sukcesa daŭrigo de tiu nepre necesa terminika/terminara laboro en la jaro 1994.

Verka agado kaj instruado plimultiĝis

Ĝojige ni povis konstati dum la jaro kreskon de la verka agado fare de niaj membroj.

La "Ekonomia Bulteno pri Usono" de nia membro d-ro Goldman, Usono (IKEF 52), laŭdinde ankaŭ ĉi-jare regule aperis ĉiumonate. Ĝian abonon ni varme rekomendas. Ankaŭ nia membro d-ro Bormann, Germanio (IKEF 27), kiu konstante lekcias en AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) denove eldonis broŝuron pri ekonomia temo, ĉi-foje kun la titolo "Mondkomerco kaj lingvo".

En "Monato", esperantlingva internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, post kiam s-ro Rotsaert (IKEF 3) fariĝis responsa redaktoro por la rubriko "ekonomio", regule aperis interesaj artikoloj pri ekonomiaj temoj. Ĉe tio distingiĝis antaŭ ĉio s-ro Rotsaert mem, plie s-ro Braun (IKEF 4), s-ro Sandelin (IKEF 134), s-ro Yamasaki (IKEF 43) kaj s-ro Zola (IKEF 181). Do la rubriko "ekonomio" dum la jaro 1993 estis unufoje kontentige plenumita. Ĉe tiu okazo ni denove volas atentigi niajn membrojn pri tio, ke "Monato" estas la ĉefa podio por nia agado. Tial ni rekomendas al niaj membroj la abonon de "Monato" kaj, se eblas, la kunlaboron per verkado de artikoloj pri ekonomiaj temoj.

Nia estrarano d-ro Picasso (IKEF 23), fakulo pri merkato kaj informado, gvidis seminarion ĉe "La Kvinpetalo" en Bouresse, Francio, kun la temo/celo, kiel formi homojn, kiuj deziras fariĝi informitaj pri Esperanto.

Praktikaj agadoj

En "Monato" denove aperis reklamanonco de germana kaj japana firmaoj, perita de s-roj Braun kaj Yamasaki. Ni opinias ke la perado de tiaj anoncoj al "Monato" kaj aliaj esperantlingvaj magazinoj estas unu el la plej efikaj agadoj.

Ankaŭ dum la jaro 1993 nia membro s-ro Alfred Schubert, Germanio (IKEF 126) eldonis tri numerojn de sia tutmonda informservo "monda merkato". IKEF daŭrigis la kunlaboron kun li, kio konsistis el tio, ke ni aperigis ĉ. 50 anoncojn pri komercaj petoj/proponoj el nepagipovaj landoj je niaj kostoj, plie ni sendigis "mondan merkaton" kiel specialan servon al ĉiuj membroj. Ni estis rigardintaj tion kiel investaĵon kaj estis kalkulintaj sekvajn enspezojn el makleraĵo pro efektivigitaj negocoj sekve de tiaj anoncoj. Bedaŭrinde ĝis nun alvenis eĉ ne unu groŝo, ĉu pro ne-efektivigo de negocoj aŭ pro ne-anonco de efektivigita negoco al ni. Same estas pri la ĉ. 40 anoncetoj rekte aperintaj en **La Merkato**.

Nia membro s-ro Basso, Francio (IKEF 67), fondis TAKE - Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj. Ĉe la fondkunveno je la 16/17a de oktobro 1993 en Mittelwihl, Francio, aktive partoprenis niaj membroj Braun, Gilbert (IKEF 14), Rotsaert kaj Texier (IKEF 76).

Spezokonto por la jaro 1993 (en belgaj frankoj)

Kostoj

	(1991)	(1992)	(1993)
Ĝeneralaj kostoj	6 953	4 818	5 305
Elspezoj terminologia laboro	4 609	11 198	1 356
Kostoj de "La Merkato"	9 650	17 397	29 594
Kostoj de afranko kaj telefonado	8 517	11 124	8 836
Kostoj de informado k.s.	4 072	9 460	239
Eldono identecŝildaro	-	-	7 464
Negativa saldo subtena fondaĵo	-	4 656	-
Kunlaboro monda merkato	-	-	12 344
Deskriboj	11 524	-	-
Rezervo identecŝildaro	10 000	-	-
Aldono al subtena fondaĵo	6 636	-	-
Neta gajno de la jaro	6 835	9 532	11 047
	<u>68 796</u>	<u>68 185</u>	<u>76 185</u>

Bilanco je 31 decembro 1993

Aktivo

	(1991)	(1992)	(1993)
Komerca terminaro (stokvaloro)	p.m.	p.m.	p.m.
Biblioteko, ekipaĵoj	p.m.	p.m.	p.m.
Poŝtĉekkonto belga	24 125	5 803	13 040
Konto ĉe Universala E-Asocio	9 660	10 568	15 041
Konto ĉe Flandra Esperanto-Ligo	15 746	20 173	16 781
Ŝparkonto ĉe Flandra E-Ligo	34 192	36 244	52 905
Kurantaj kontoj estraranoj	617	1 017	1 417
Neta malgajno de la jaro	-	-	-
	<u>84 340</u>	<u>73 805</u>	<u>99 135</u>

Detaloj kurantaj kontoj estraranoj:

Aktive: König, Pasive: Braun 1 772; Gilbert 1 452

Spezokonto por la jaro 1993 (en belgaj frankoj)

Rimedoĵ

	(1991)	(1992)	(1993)
Membrokotoj	30 370	35 347	41 600
Donacoj kaj krompagoj	22 431	25 119	26 599
Gajno pro peradventoj, reklamanoncoj kaj kurtaĝoj	14 537	-	68
Ricevita rento	803	2 052	1 661
Eldono identecŝildaro	655	1 833	-
Vendoj komerca terminaro	-	2 964	3 679
Vendoj Ekofomo (Economie-Finance-Monnaie)	-	870	2 578
Neta malgajno de la jaro	-	-	-
	<u>68 796</u>	<u>68 185</u>	<u>76 185</u>

Bilanco je 31 decembro 1993

Pasivo

	(1991)	(1992)	(1993)
Transira konto	-	-	11 966
Kotizoj antaŭpagitaj	16 612	18 886	13 963
Kapitalo dumvivaj membroj	13 389	13 389	20 189
Subtena fondaĵo	10 000	-	-
Rezervo "identecŝildaro"	10 000	-	-
Kurantaj kontoj estraranoj	5 075	2 734	3 224
Kapitalo	22429	29264	38796
gajno	6835	9532	11047
nete	29264	38796	49843
	<u>84 340</u>	<u>73 805</u>	<u>99 185</u>

Donacoj: Pirlot 400; Yamasaki 750

Nome de IKEF la kasisto esprimas sian dankon.

La "identecŝildaron" (registro de la IKEF-membroj kun specifaj informoj) prizorgis kaj ĝisdatigis nia estrarano s-ro Gilbert, Francio.

Nia ĉina peranto, s-ro Wang Tianyi (IKEF 117), rolis kiel interpretisto kaj peranto okaze de akcepto de du delegacioj de ekonomiistoj el Rusio en sia hejmurbo Xi'an. Reciproke li gvidis ĉinan delegacion al Samarkand, Uzbekio.

Nia membro el Hong Kong, entreprenisto s-ro Lee Teck Shiu (Espero Enterprises, IKEF 11) faris vojaĝon al Germanio kaj Belgio. En Germanio li vizitis i.a. sian komercan partneron Braun ĉe firmao Robert Bosch, kaj en Belgio i.a. s-inon Witdoeck (IKEF 78), kiu diversmaniere komercas kun Ĉinio.

Nia membro s-ro Kees Ruijg, Nederlando (IKEF 68), organizis tradukon de kelkaj formularoj por la internacia komerco en Esperanton.

Ĝenerala Kunveno 1993 en Valencia

La Ĝenerala Kunveno 1993 de IKEF-membroj okazis kadre de la Universala Kongreso en Valencia je la 26a de julio 1993. Ĉeestis 30 personoj, duone membroj, duone interesatoj. La raporton pri la kunveno verkis s-ro Yamasaki en **La Merkato** n-ro 42. Bedaŭrinde niaj membroj en Hispanio ne sukcesis organizi viziton ĉe firmaoj aŭ institutoj (kiel ekzemple estis farite en Bergen kaj Vieno en la antaŭaj jaroj).

Resumo:

En 1993 la membrara nombro unufoje malkreskis. Tamen inverse la agadoj plimultiĝis. Tio signifas, ke la unuopaj membroj de IKEF averaĝe plifortigis sian aktivecon. IKEF gajnis intertempe ĉe UEA kaj aliaj asocioj plian renomon.

Tamen multaj utilaj agadoj estas farendaj. La kampo de nia profesio, komerco, ekonomio kaj ekonomiko, estas tiom vasta kaj profunde fekunda, ke per inteligenta kaj senlaca kultivado, malgraŭ supraĵa hardiĝo, fruktodona sukceso ŝajnas neevitebla. Kompreneble necesas persistemo, pacienco kaj firmeco, por elteni transirajn malsukcesojn.

Financa raporto por la jaro 1993

Ĉifoje la spezokonto de IKEF montras gujnon de 11.047 frankoj; la kapitalo de la asocio kreskis al 49.843 frankoj kaj la bilanctotalo preskaŭ atingis 100.000 frankojn.

Mi donas klarigon pri kelkaj ciferoj:

- ♦ **La Merkato** kostis pli ol antaŭvidite, Parta kaŭzo estas pli altaj kopiad- kaj sendokostoj. En la nuna spezokonto estas 5 anstataŭ la kutimaj 4 numeroj, ĉar la numero de januaro 1994 jam estis preparita en decembro 1993.

- ♦ La aperigo de anoncoj en *monda merkato* kaj ĝia dissendo al la IKEF-membroj kostis entute 12.344 frankojn. Ĉefa parto de tio estis pagita nur komence de 1994 kaj troviĝas sub "transira konto" (11.966 frankoj).
- ♦ Kvankam la sumo de la membrokotizoj atingas rekordan sumon de 41.600 frankoj, ŝajnas ke la membronombro stagnas. Regule okazas ke iu sendas aliĝilo, sed ke ne sekvas pago. Konstateblas ke multaj membroj el landoj kun pagproblemoj ja unu aŭ du fojojn pagas kotizon, sed poste ne plu kapablas rekotizi aŭ perdas intereson pri la asocio.

Mi ĉi-jare ne faris buĝetproponon, ĉar nur surbaze de la nun sendataj ciferoj la estraro povas juĝi pri kelkaj elspezoj jes aŭ ne farotaj dum 1994:

- ♦ La stoko de IKEF-informiloj estas preskaŭ eluzita. Necesos desegni kaj presigi novan kvanton. Ankaŭ necesos konigi nian asocion tra reklamanoj en la E-gazetaro kaj aliloke.
- ♦ Ni demandu nin kiomgrade la kunlaboro kun *monda merkato* utilas. Venis prezoferto por daŭrigo de la kunlaboro dum 1994, sed la kosto estos - i.a. pro altiĝinta poŝtarifoj - konsiderinde pli (20.000 - 25.000 frankoj).
- ♦ IKEF akiris sufiĉe grandan kapitalon. Eble estas novaj projektoj lanĉotaj; mi tiurilate memorigas la diskutpaperon pri eldonado de fakaj libroj kiun mi sendis al vi antaŭ kelkaj semajnoj.

Roland **Rotsaert**, Kasisto

Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE)

En januaro aperis numero 1 de la TAKE-revuo "La Domo - Jarcento 21". En ĝi i.a. estas raporto pri la kolokvo in Mittelwihl (16-17 oktobro 1993) kaj fakaj artikoloj. En venonta numero leganto trovos informojn pri: konkurso pri arkitekturo, ekzemplo de pragmata ekologio domaro, kiel valorigi siajn entreprenon aŭ asocion, konsiloj pri merkatico.

Kotizoj varias laŭ lando kaj profesio. Informoj: s-ro Bruno Schmitt, TAKE, RN 83, Rue du Tiefenbach, F-68920 Wintzenheim-Colmar, Francio; fakso 89.79.79.93.

Eldono de fakaj libroj en Esperanto

Jam en LM42 (p. 9) aperis alvoko pri tiu temo, al kiu ne venis multe da reagoj. Intertempe la estraro de IKEF daŭrigis la serĉadon. Evidentiĝis ke ekzistas intereso (vidu ekz. revuon Esperanto, marto 94, p. 45) kaj iom da mono por eldoni tian serion de libroj, sed ĝis nun ne troveblis pretaj, uzablaj nacilingvaj tekstoj kiujn ni povus traduki. (Por mem verki serion ne ekzistas la kapacitoj ĉe IKEF.) Proponoj do restas bonvenaj.

RR

Kontaktoj kun komercaj ĉambroj

La E-grupoj el franclingva Belgio tradukas la anoncojn el monda merkato (kiuj cetere grandparte estas liveritaj de IKEF) kaj disponigas ilin al la komercaj ĉambroj de sia regiono. Sekvinda iniciato !

La Raŭma vojo

Fine de la artikolo de Marco Picasso (LM 43, p. 8) estis menciita "la Raŭma vojo". Ĉar tiu esprimo eble ne por ĉiuj legantoj estis konata, jen mallonga klarigo.

Antaŭ pluraj jaroj, junaj esperantistoj dum internacia kunveno en Raŭmo (Finnlando) asertis ke estas pli grave profundigi sin en la utiligo de Esperanto, ol konvinki eksterulojn. RR

Pripensenda ...

"Ne multe pli bona estas la situacio en fak-gazetoj. Ankaŭ en ili oni trovas kutime nur movadajn temojn, sed apenaŭ fakajn artikolojn. Kial mi legas en Monato multe pli pri ekonomio ol en La Merkato, organo de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo ? ..."

(el prelego de Stefan Maul pri Problemoj de la Esperanto-gazetaro, Internacia Ĵurnalistoj, 1-2/94)

Terminologio

Unua E-terminaro sur CD-ROM ?

Kompaktaj diskoj (laŭ angla mallongigo: CD) jam iĝis la kutima ilo por registri muzikon. Iom post iom la sama teknologio estas ekuzata por registri amasajn donitaĵojn, ekzemple enciklopediojn kaj vortarojn, konsulteblajn per komputilo. Tiujn oni nomas "CD-ROM".

En la printempo de 1994 estas planata la aperigo de CD-ROM-versio de la multlingva fervoja terminaro (kun i.a. Esperanto), prizorgita de la Internacia Fervoja Unuiĝo (UIC). Ĝi havos diversajn serĉeblojn kaj estos ligebla al aliaj komputilaj programoj.

Informoj: UIC, fakso +33-1-44.49.20.59

(el brita Passenger Rail Management, okt. 1993)

Terminologia Centro de UEA - oficejo en Ĉeĥio

En la revuo Eventoj ekde nun regule aperos informoj pri la (kompatinda sed ne senespera) stato de la TEC-oficejo en Kladno, Ĉeĥio. Oni bonvolu sendi informojn pri terminologiaj aferoj al Panglotte/TEC-CS, Zádusní 3092, CZ-21201 Kladno (oficejo) kaj al s-ro Árpád Máthé, Tusnádi u. 14, H-1135 Budapeŝt (redaktoro de la materialo).

Maŝinelementoj

Eldonanto estas serĉata por esperanta lernolibro por industriaj mezlernejoj (ankaŭ utila por interesitoj pri maŝinfarado). Amplekso: 288 A4-paĝoj; 796 bildoj. Kontakto: Aleš Bendarík, Lotyšská 8, CS-82106 Bratislava, Slovakio.

E-mail

Ĉu multaj IKEF-membroj havas aliron al iu sistemo de elektronika poŝto (CompuServe, Internet...)?

Se jes, bonvolu sciigi tion al Roland Rotsaert, por ke la estraro povu juĝi ĉu ankaŭ alirol de IKEF al tia reto povas utili.

Kalendaro

Aranĝoj en regiono Languedoc-Roussillon (Francio, apud Mediteranea Maro)

7-11 majo 1994, Agde: lingvaj staĝoj diversnivelaĵ. Informoj: sino Suzanne Authier, 9 rue Georges Picot, F-34500 Béziers, tel. 33-67.31.13.18.

11-15 majo 1994, Agde: 86a Franca Kongreso. Informoj: s-ro Charles Gerard-Voincon, 4 Rue du Docteur Rives, F-66000 Perpignan, tel. 33-68.55.51.77.

3-10 septembro 1994, S.te: 20a Internacia Semajno de Esperanto. Diversnivelaĵ kursoj gvidataj de eminentaj geinstruistoj en bela parko apud la maro. Informoj: Centre Culturel Esperanto, 5 Rue du Docteur Roŭ, F34000 Montpellier, tel. 33-67.54.15.43

Akademio Kolokvo en Prago (Ĉeĥio)

Akademio de Esperanto aranĝas publikan kolokvon pri la stato kaj estonteco de la Internacia Lingvo en Prago je 7-14 julio 1994. Aliĝkotizo: 180 DEM; loĝado inter 9 kaj 89 DEM po persono kaj tago. Kontaktadreso: Petro Chrdle, AdE-kolokvo, Anglická 878, CZ-252 29 Dobruĉovice; tel./fakso 42.2.9912126.

Internacia Simpozio pri Entreprenado pere de Esperanto

okazos de la 10a ĝis la 13a de oktobro 1994 en Skokovy, Ĉeĥio. Sekvas (de 13a ĝis 16a de oktobro) turisma aranĝo "Perloj de Suda Bohemio". Informoj: "Kava-Peĉ", Anglická 878, CZ-252 29 Dobruĉovice.

(el E-kalendaro de Monda Turismo)

Dua transnacia renkontiĝo de S.A.T. en Zheng Zou, Ĉinio, 6-10.8.1994

Alĝkotizo: 20 USD; restado: 100 USD je persono por loĝado kaj manĝado; ekskurso 50 USD. Antaŭe (5-10.8.1994) okazos vojaĝo en Ĉinio (Tianjing Pekinio-Xi'an-Luoyang-Zhengzhou); kosto 30 USD tage. Kontakto Wang Tianyi, Shaanxi-gang-Chang, CN-710043 Xi'an.

Komercaj petoj kaj proponoj

Angola

Detalkomercisto de tekstilo kaj vestaĵoj deziras importi varojn. S-ro J.C. Nsoko-Tukifimpa-Nkwangio, B.P. 5433, Luanda; telefono (nur france) 35.40.91.

Belorusio

Kuracisto, fakulo pri prevento de malsanoj, proponas nutraĵojn sanigajn kiuj preventas malsanojn, stabiligas kontraŭ streso kaj plialtigas vivkvaliton. S-ro Prjahnin Vladimir Petrovic, str. Kalinovskogo 46-59, 20086 Belorusio; tel. (8-0172) 630-865.

Brazilo

Solvebla kafo: 1,00 USD/ FOB Santos, po ladskatolo 200 kg, minimuma mendo 20 FTj (27.360 litroj); pago kontraŭ kreditletero. Branco Peres Ltda, Av. Rio Branco 1108, Ĉ. Postal 282, CEP 17800-000, Adamantina - SP, fakso (0189) 21-3232 k 21-3316.

Bulgario

Turismaj aranĝoj en Bulgario; transitaj servoj kaj hotelrezervado por Turkio kaj Grekio; enlanda kaj internacia komerco. Angel Todorov, STELO TUR, Str. "Ljuben Karavelov" n-ro 68 (III etaĝo), BG-1000 Sofio; tel+fakso 359-2-66-28-97.

Ĉeĥio

Oferto: puriĝaretoj (EASTMOP), ĉiuspecaj glumarkoj, etikedoj k.s. Bartere: legomoj kaj fruktoj (po kamiono) kontraŭ ĉio ajn havebla sur ĉeĥa merkato. Jindra Oprsál, Loučná 74, CZ-788 11. Fakso +42/649/94206 (tra Brokes).

Ĉinio

Semojn de legomoj bongustaj por plantado en ĉina kamparo deziras ricevi s-ro Petro S. Kaiz, 1-301 shi 7 hao Lou, CN-157300 Tongtian Lu, Suifenhe, Heilongjiang. Bv. aldoni indikojn pri plantperiodo k.s. Interŝanĝo eblas.

PACOTUR bonvenigas al Ĉinio diversajn karavanojn kaj ankaŭ okupiĝas pri ĉiuj privataj vojaĝ-demandoj pri Ĉinio. Adreso: Chang Le Zhong Lu 21 Hao, CN-710032 Xi'an; tel./fakso +86-29-323-8859, telekso 70182 SXSTW CN.

Perado por diversaj eksportataj kompanioj en Xinjiang Ujgura Aŭtonoma Regiono. S-ro Liu Xiao she (Solis), Xinjiang Tea & Animal By-prod.Corp., CN-830002 Urumqi, tel. +86(991)228799.

Madagaskaro

Eksporto de minaĵoj ((smeraldoj, beriloj, turmalinoj, kvarcoj, jaspoj...) kaj agrikulturaĵoj (vaniloj, kafoj, kariofiloj, licioj...) Importo de elektraj motoroj, agrikulturaj maŝinoj, ladaĵoj, aŭtopecoj a.a. Esperanto Societo pri Minekspluatado, Lot IVB, 71 Ambohimiadana Sud Ambohimaranina, Antananarivo - 101, tel. 302.05, fakso (261) 2.312.01.

Rusio

Grafika desegno-arto kaj presado ("DTP"), perado en fakoj instruado-kulturo, komerco, reklamo en gazetaro kaj loka radio/televido. Asocio "VERESK", s-ro Igorjo Sitnikov, ul. Internacionalnaja d. 19, kor. 1, kv. 59, 390039 Rjazan'. Kontaktoj eblas angle, esperante, germane, hispane, svede k.a.

Plastaj tuboj kaj aliaj plastaĵoj; lignaĵoj. "GALANT", Borovajo 1 Tihvin, RUS-187500 Sankt-Petersburgskaja oblast. Fakso (81267) 11372.

Ukrainio

Transporto de ŝarĝoj kaj personoj en eksa-SU kaj cetera Eŭropo. Eksporto de brodaj naciaj ĉemizoj, tukoj k.s., diamantaj (sintezaj) instrumentoj, elektraj moviloj, lampoj, kompresoroj, agrikulturaj varoj. Importo de vestoj, ŝuoj, hejmaj kaj agrikulturaj maŝinoj, bicikloj, aŭtoj, traktoroj. Principe bartera (interŝanĝa) komerco. Ivan Lisenko, Firmao LIGAS, A/K-37, UA-14000 Poltava, tel. 05322-21427. (detaligo de anonco el LM43)

Hobiistoj

En Esperanto "-isto" esprimas profesion. Hobiistoj do estas homoj, kiuj havas hobion kiel profesion! Kvankam Esperantistoj praktikas Esperanton plejofte kiel hobion, ili laŭgramatike estas profesiuloj (ĵen alia strangaĵo: kial ne profesiistoj? Ĉu profesiuloj havas profesian karakteron?). Ĉu tiu Esperantokonfuzo estas la kaŭzo, ke pluraj Esperantistoj, precipe en Ĉinio kaj Orienta Eŭropo, konsideras sian internacian komercan hobion profesio?

Mi bone komprenas la situacion. La reĝimo ŝanĝiĝis (en Ĉinio ŝanĝetiĝis), do oni volas utiligi la internacian lingvon por komerci, t.e. gajni monon.

Dolarsignoj en la okuloj de kapitalistoj ja estas normalaj en la "okcidenta" mondo. Se oni kredas Donald Duck, jes.

Iĝu membro de IKEF (aŭ eĉ ne) kaj jen garantio al grasa ŝparkonto. Bedaŭrinde tiel ne estas.

Komerco estas kompleksa **profesio**.

Por (internacie) komerci oni bezonas scion kaj sperton. Scion oni akiras lerneje, sperton nur post multjara praktikado. Ekzistas speciala esprimo por ĝi en Esperanto: **S+S** (angle: **know-how**).

Karaj hobianoj (mi esperas, ke ne hobiuloj): ne ofendiĝu. Tiu-ĉi leĝereco ne nur en Esperanto-rondo regas. Pro la granda senlaboreco ankaŭ en la "okcidento" multaj homoj volas eki sian propran "bizneson".

Min vizitas multaj tiaj kuraĝuloj en mia Komerccambra oficejo. Por homoj kiuj neniam komercis, mia konsilo estas simpla: unue sukcesu en via propra lando kaj nur poste ekinternaciĝu.

Vane mi reagis al petantoj kiuj volas vendi siajn produktojn aŭ ofertas siajn servojn per Esperanto. Ili simple ne povas verigi siajn promesojn.

En Slovakio iu Esperanto-kultura organizo de unu momento al la alia ŝaltas (saltas) al la Esperanto-komerca organizo. Sed respondi al komerca letero oni ne povas.

Ĉinoj ofertas helpon kaj investon por komercaj projektoj. Sed se oni kontaktas ilin pro konkreta projekto, ili subite "ne estas hejme".

Krome ili kombinas sciencinstruadon kun komerco, io kio ne estas konata en la cetera mondo, do ĉie estas konsiderata stranga.

Alia handikapo, neniel rilatanta al Esperanto, por homoj el la ekssocialisma sistemo estas ke ili ankoraŭ ne sufiĉe bone konas la kondiĉojn de la t.n. libera merkato de la "okcidento". Sed nuntempe en la libera merkato oni ne vendas kion oni produktas, sed oni produktas kion petas la merkato.

Ankaŭ konstanta kvalito, ĝustatempa liverado kaj aliaj kriterioj estas aferoj kies enhavo ankoraŭ diferencas inter "oriento" kaj "okcidento".

Sed krom ĉi tiuj subjektivaj handikapo ankaŭ estas objektiva obstaklo. Nome ke en la "industria mondo" mankas la industrioj kaj komercistoj kiuj aplikas la internacian lingvon.

Ni devas agnoski, ke (sukcese) komerci kaj negoci per Esperanto restos raraĵo.

Ĉu do ni devas akcepti, ke Esperanto ne povos ludi rolon en la internacia komerco kaj do ni rezignu? **Neniel!** Sed ni ne provu amatore konkurencigi Esperanton kun la profesia angla k.a.

Ni serĉu pri du eblecoj, sed mi invitas la belegantojn trovi aliajn niĉojn.

1.

Mono esencas en la entreprenado. Idealoj malmulte valoras en la negocado. Sed se **"idealo = mono"**, la situacio ŝanĝiĝas.

Pensu ekzemple pri la "verda" industrio. En la kadro de lingva egaleco vendisto povus oferti specialan rabaton, se la negoco okazu en la internacia lingvo. Same aĉetonto povus oferti pli favorajn aĉetkondiĉojn ĉe apliko de Esperanto (oni eĉ povus jam presi tion en la ĝeneralaj liverkondiĉoj).

Ĉi tiu niĉo estas kompreneble limigita je samideanaj entreprenistoj. Sed eble tio instigos firmaojn instrui la Internacian Lingvon al propraj negocistoj kaj merkatumistoj, aŭ iu Esperantlingvajn stabanojn.

2.

Pli grandajn eblecojn donos la niĉo de informado, konsilado kaj perado.

Proprasperte mi scias, ke pli malgrandaj entreprenoj ĉiam havas problemojn akiri la ĝustajn informojn pri siaj eblecoj en aliaj landoj.

Esperantistoj kun bonega scio pri la politiko, ekonomio, industrio kaj komerco en sia lando kaj kiuj havas bonajn kontaktojn kun utilaj kaj influhavaj personoj kaj kiuj konas sian vojon en tiuj cirkloj, povas ekscelente servi al eksterlandaj entreprenistoj. Oni nomas tiajn personojn ŝlosilposedantoj. Kaj ili necesas ne nur en Orienta Eŭropo kaj Ĉinio, sed **ĉie en la mondo**.

Ilia potenco estas havi amikojn, konatojn ene de la registaro, instancoj, firmoj. Ili scias fari la ĝustajn kontaktojn por siaj klientoj, montri al ili la vojon, solvi problemojn kaj burokratiaĵojn.

Do ili nenecese mem estu industriistoj aŭ komercistoj. Povas esti oficistoj, eksoficistoj, (eks-)diplomatoj, estroj de (ŝtat-)kompanioj, pensiuloj ktp., mallonge ĉiuj kun uzebla reputacio kaj kiuj ĝuas konfidon.

Ili povas esti la gluo inter eksterlanda kliento kaj loka industrio, funkcias kiel tria punkto de triangulo.

Jen montriĝas la utilo de Esperanto, jen oni povos kreskigi la reputacion de la internacia lingvo. Vere **per** Esperanto.

Kompreneble tiaj servoj estas ofertataj de ne-esperantistoj. Tamen ekzistas multe da blufado kaj trompado en tiu sektoro.

Se Esperantistoj scipovas garantii bonan kvaliton, durajn informojn, fidindajn kontaktojn, ili povos distingi sin, kaj Esperanto sinonimos fidindecon en la internacia merkato..

Flegado de la necesa retaro profitigos la peradon.

Kompreneble ankaŭ inter la Esperantistoj troviĝas fiuloj kiuj pensas rapide riĉiĝi per blufado kaj trompado, kaj kiuj povas ege damaĝi al ĉi tiu Esperanto-servo kaj tiel ĝian reputacion. Tial necesos kvalitsistemo. Eble IKEF povus fari tion.

Unue ĉiuj tiaj konsilistoj devus esti membro de IKEF.

Due ili devus submeti pruvojn (atestilojn, referencojn) de sia kvalito, kaj ili devas esti ankaŭ bonaj Esperanto-parolantoj.

Trie IKEF kontrolu la pruvojn (ekz. per landa IKEF-peranto aŭ UEA-delegito).

Kvare post aprobo de IKEF (ankaŭ pri la tarifoj) la konsilisto rajtas sin nomi IKEF-konsilisto.

Kiel Esperanto iam, dum la unua mondmilito, ludis gravan rolon por la Ruĝa Kruco perante en la trovado de malaperintoj, tiel nun Esperanto povas ludi samvaloran perantan rolon en la komerca mondo ... sen amatorisma hobiismo.

Komentoj kaj reagaj ideoj bonvenegas.

Inĝ. Kees **Ruig**
Malden, Nederlando.

Novaj membroj

181. S-ro Zandandu Ntomono Zola, B.P. 409, Kisangani, Zairio
182. S-ino Maria Goranova, Tolstoj bl. - 48 enirejo ap. 68,
BG-1220 Sofio, Bulgario
183. S-ro Huang Zheng Su - Firmao SIDA, Livan Lu 26, Box 136,
CN-230069 Hefei, Ĉinio
184. S-ro Armand Hubert, 13 chemin de la Solitude,
F-57200 Sarreguemines, Francio
185. S-ro Harald Schicke, Im Heidewinkel 45, D-21271 Asendorf, Germanio
186. S-ro Ivan Nikolov - Firmao Esper-Komerc, P.K. 158,
BG-5250 Svištov-c, Bulgario